
# BONA ESPERO

## 68-a UK Budapeŝto: Raporto de C.S. Beckford




SPECIALA ELDONO DE SEA

# TAGLIBRO PRI 13 TAGOJ EN ESPERANTUJO

de

COLIN BECKFORD

---

25 julio 1983

Mia rakonto komencas per tre malagrabla sperto. Kiam mi alvenis ĉe la giĉeto en London (Heathrow) flughaveno, oni informis min, ke la komputilo ne volas akcepti min! Malgrau tio, ke mi ja mendis lokon, kaj pagis por ĝi en Cape Town du semajnojn antaŭe, oni diris, ke British Airways vendis pli da sidlokoj ol kiom ili havis; mi do devis atendi kaj esperi, ke iu pasaĝero ne venos. Tiaj aferoj okazas de tempo al tempo; oni legas pri ili en gazetoj, sed kiam ĝi okazas al si mem, tio estas tute alia afero! Temis pri flugo al Prago, kie mi volis pasigi kelkajn tagojn kun plumamiko kun kio mi neniam antaŭe renkontiĝis. Kompreneble mi antaŭe informis lin pri mia alventempo ĉe Prago, kaj li jam informis min pri la ekveturhoroj de trajnoj al lia hejmurbo, Ceské Budéjovicé, en la sudo de Ĉeĥoslovakio.

Dum mi atendadis, mi pli kaj pli maltrankviliĝis. Iom helpis la informo, ke la flugo malfruiĝos je unu horo. Finfine oni sciigis, ke ja estas sidloko por mi.

Dum la iom malpli ol duhora flugo mi konatiĝis kun la pasaĝero apud mi - Profesoro Doktoro Olexa, kiu instruas la anglan lingvon ĉe universitato de Bratislava. Mi eltrovis, ke li iam lernis Esperanton kaj li tute komprenis kiam mi parolis Esperantlin-

gve. Li tamen respondis en la angla. Prof. Olexa helpis min tra la doganoj ĉe la praga flughaveno kaj ni kune prenis taksion al la urbocentra fervojstacio. Mi disponis pri tri liberaj horoj antaŭ la ekveturo de mia tajno, kaj Prof. Olexa havis kelkajn liberajn horojn ĝis la tempo por sia flugo al Bratislava. Do, post kiam mi aĉetis veturbileton kaj postlasis mian valizon ĉe la stacio, Prof. Olexa komencis montri al mi la malnovan, sed belan urbon. La tempo forflugis kaj ni revenis ĉe la stacio nur 13 minutojn antaŭ la forveturo de mia trajno. "Ĝuste sufiĉas por rehavigi mian valizon" mi pensis, sed per tiuj vortoj mi ege eraris. Mi ja atendis 15 minutojn por postlasi mian valizon, sed supozis, ke tio estis iom eksterordinara. Mi lernis laŭ malfeliĉa maniero, ke en orient-eŭropaj landoj oni treege ofte viciĝas, atendas kaj atendas kaj atendas....... Ĉefe pro ŝanĝo de deĵorantoj, dum longa tempo neniu deĵoris ĉe la koncerna giĉeto kaj mi atendis 45 minutojn antaŭ ol mi ricevis mian valizon. Kompreneble mia trajno jam antaŭlonge foriris! Mi devis telefoni longdistance al mia amiko kaj klarigi, ke mi malfruos, ĉar mi devis atendi pli ol 2 horojn por la sekvonta trajno. Oni nomis ĝin "rapid-trajno"-n, tamen la veturo de 169Km postulis 3½ horojn! Mi finfine atingis la urbon Ceské Budéjovicé kie mia amiko Evzen atendis min, je 22h30.

<u>26 julio 1983</u>

Mi hodiaŭ faris mian devigan viziton al la policejo, kion devas fari ĉiu fremdlanda vizitanto. Denove mi longe atendis. Poste mi iris kun Evzen al vilaĝo Borek, kelkajn kilometrojn for de Ceské Budéjovicé. Vespere mi vizitis trinkejon. Estas multaj tiaj trinkejoj kiuj estas nomitaj "restoracioj" sed por mi tio ne estas ĝusta priskribo. La



Ĉeĥoj estas, post la germanoj, la due plej grandaj biertrinkuloj en la mondo kaj tio evidentiĝis. Eble pro la varmega vetero (pli ol 30°C) ĉiu trinkejo estis plenplena, kaj kelkfoje dum mia vizito la biero elvendiĝis en la trinkejoj (sed ne pro mi!).

<u>27 julio 1983</u>

Hodiaŭ mi vizitis belan kastelon apud Ceské Budéjovicé. Ĉeĥoslovakio havas multajn tre vizitindajn malnovajn konstruaĵojn. Bedaŭrinde, la gvidistino parolis nur ĉeke. Tamen, en apuda muzeo mi trovis maŝinon kiu, post enmeto de monero, laŭtporolis anglalingve.

<u>28 julio 1983</u>

Je 15h05 mi ekveturis per aŭtobuso al Bratislava. Tre bonŝance mi antaŭmendis sidlokon, ĉar la aŭtobuso estis plenplena. Eble pro tio ĝi ekveturis 5 minutojn antaŭtempe. Dum la 6-hora veturo nombro de pasaĝeroj staris 4 horojn kaj multaj veturontoj estis postlasitaj ĉe bushaltejoj ĉar mankis sidlokoj (eĉ starlokoj) por ili. Se ili intencis preni la venontan aŭtobuson, ili devis atendi ĝis la sekvonta tago. Mi scivolis kion ili faris, postlasitaj de la dua kaj lasta buso de tiu tago.

La buso alvenis ĉe Bratislava 10 minutojn frue (tio neniam okazas en okcidento!) kaj mia nova amiko Prof. Olexa atendis min. Mi tranoktis kun li. La Profesoro havas pli da "Klasikaj" anglalingvaj romanoj ol mi havas - dum kelkaj jardekoj li tradukis ilin en la ĉeĥan. Verkojn de Dickens, Brontë, Eliot kaj multaj aliaj anglaj aŭtoroj li tradukis. Tamen, antaŭ ol iri al lia apartamento mi volis trinki bieron. Ni ja devis elserĉi trinkejon ĉar kelkaj jam elvendis sian bieron pro la

varmego. Ne licis al Prof. Olexa mem trinki alkoholaĵon, ĉar li veturigis min per sia aŭtomobilo kaj en tiu lando estas malpermesate engluti eĉ unu trinkaĵon, kaj tiam ŝofori. (Mi poste eltrovis, ke estas same en Hungario.)

29 julio 1983

Post 3½-hora veturo per trajno mi atingis Budapeŝton. Mi prenis taksion (estis malmultekosta) al mia hotelo kiu, je mia granda surprizo, estis multe pli luksa ol mi atendis, proksimume tristela. Esperantistino bonvenigis min, do mi tuj sentis min inter amikoj.

30 julio 1983

Mi promenis al la kongresejo, kiu aspektis kiel abelujo. Esperantistoj svarmis ĉie. Mi kalkulis, ke estis 35 homoj ĉe la giĉetoj, kaj tutcerte mi ne vidis ĉiujn. Jen la plej grava kialo pro kio ni ne povus gastigi kongreson en Sudafriko - mankas laborforto. Mi lasis ĉe la rendevua tabulo notojn por kelkaj homoj kun kiuj mi deziris renkontiĝi. La kongresejo mem estis granda, cirkla sporthalo, duonigita per grandegaj kurtenoj, sur kiuj pendis flagoj de ĉiu lando de kie venis kongresanoj.

Posttagmeze mi iris al Margaret-Insulo, kiu situas meze de la Danubo. Ĝi estas bela kaj mi rondveturis ĝin per mallarĝtraka fervojo.

31 julio 1983

Mi iris al la kongresejo iom antaŭ la 10-a por la komenciĝo de la Solena Inaŭguro. Samkiel ĉe Lucerno en 1979, preskaŭ ĉiu kongresero komenciĝis malfrue kaj tio iomete ĉagrenis min. La kongresa Alta



Protektanto, Vicprezidanto de la Prezidio de la Hungara Respubliko, Sandor Gáspár, salutis la kongreson kaj s-ro Richard E. Butler, Ĝenerala Sekretario de la Internacia Telekomunika Unio kaj Ĉefordiganto de la Monda Komunika Jaro, alparolis la kongresanaron.

Posttagmeze okazis la Malfermo dum kiu mi donis al la kongresanoj la bondeziroj de membroj de SEA.

Tiun vesperon mi iris al la plej granda parko en la urbo, kie la lokaj Esperantistoj aranĝis programon por allogi ne-Esperantistojn kaj interesi ilin pri la lingvo. Oni intervjuis kelkajn Esperantistojn per laŭtparolilo, ŝvebis granda balono kun Esperanto-reklamo, kaj sur la scenejo oni muzikludis, kantis kaj dancis. Mi aranĝis rendevuon ĉe la kongresejo je 19h00 sed tute devojiĝis promenante tien. Finfine mi prenis taksion!

1 aŭgusto 1983


Mi intencis ĉeesti komitatkunvenon de UEA, kiun oni anoncis por la 9-a horo. Je 9h10 nur kelkaj komitatanoj vidiĝis kaj estis nenia signo, ke la kunveno baldaŭ komenciĝos, mi do foriris. Mi poste sciiĝis, ke ĝi komenciĝis je 9h35.

Mi serĉis monŝanĝejon kaj devas vice atendi preskaŭ tutan horon. Dum tiu tempo multaj aliaj homoj alvenis kaj mi estas certa, ke la plej lastaj el ili devis atendi 1½ horojn. Kial devas esti tiel en socialismaj landoj? Tamen, se paroli pri atentado; ĉe la kongresejo oni devis atendi du horojn por aĉeti filatelaĵojn. Tion mi rifuzis fari. Ĉu la LKK ne povis trovi pluan deĵoranton por tiu giĉeto?


Posttagmeze, eĉ en la varmego, mi suprengrimpis la

# KONGRESA PANORAMO

Malsupre: Esperantaj flagoj heroldis pri la UK sur la ĉefaj avenuoj de Budapeŝto. Ĉi tie jen la avenuo Rákóczi, la malgranda strateto dekstre estas strato Kenyérmező, kie troviĝas la sidejo de HEA.




## La solena inaŭguro



Ne malpli ol 5500 personoj plenigis la Salonon Zamenhof dum la Solena Inaŭguro. Ekzistis specialaj enirbiletoj nur por tiu ĉi aranĝo, kaj profitis la eblon multaj Budapeŝtaj esperantistoj, kiuj ne povis partopreni la tutan Kongreson

La Internacian Korusan Konkurson povis aŭskulti ne nur la kongresanoj, sed ankaŭ ĉiuj Budapeŝtaj kantamantoj





Parto de la rekorde granda aŭskultantaro: en la unuaj vicoj sidas la diplomatoj kun siaj interpretistoj


**La Alta Protektanto, Sándor Gáspár salutas la Kongreson**




La 31an de julio en la Urba Parko okazis renkontiĝo de la kongresanoj kaj la Budapeŝtanoj, kun riĉa kultura programo




# Pri la teatraĵ programoj



**Sceno el „La Kastelo de l' Blubarba Princo", en la prezento de la trupo „Garabonciások"**

**Sceno el „Sen Eliro". De maldekstre: François Lo Jacomo, Sylvie Bonnet kaj Michel Audibert**



# Gaja Mondkongreso





Citadelon - monteton supre de kiu troviĝas memoraĵoj honore al paco kaj al la soldatoj, kiuj pereis dum la dua mondmilito.

2 aŭgusto 1983

Hodiaŭ mi partoprenis la kongresan ekskurson al Vészprem kaj Herend. Ĉe Herend ni vizitis ekspozicion pri porcelanaĵoj. Ni meztagmanĝis inter 13h00 kaj 14h00, sed kiam ni sidiĝis por vespermanĝi je 17h00 neniu havis apetiton! Tio ne estis bone organizita.

3 aŭgusto 1983

Ĉi tiu estis la plej ĝuinda tago de mia ferio. Ĝi ne bone komenciĝis - mi faris ekskurson kaj devis esti ĉe la fervojstacio Keteli je 6h00 do ne matenmanĝis. Rapidtrajno "Tokaj Ekspreso" veturigis nin al orienthungario. De Tokaj ni iris per aŭtobuso al Abaujszánto, naskiĝloko de Kálman Kalocsaj. La urbo faris omaĝon al Kalocsaj kaj la festo komenciĝis per paroladoj de la urbestro kaj aliaj. Sekvis koncerto en kiu lernantinoj kantis Esperantlingve. Ili komencis per "Mia Kara Klementin" kaj ne nur kantis bonsone, kaj vere kune, sed tre profesie. Ni poste promenis al novfondita muzeo pri Kalocsaj kaj Esperanto. Ekstere oni plantis arbon memore al Kalocsaj kaj vendis filatelaĵojn, ekz. kovertojn kun la nova Esperanto-poŝtmarko kaj memorvortojn pri la la okazaĵo. Post la vizito al la muzeo la urbestro nomis urbostratonlau Kálman Kalocsaj. Kelkaj aliaj okazintaĵoj tiutage plaĉis al mi - mi renkontiĝis, tute hazarde, kun viro el Hispanujo kun kiu mi korespondis dum ioma tempo, kaj mi ankaŭ renkontis francan sinjorinon, kiun mi antaŭe renkontis ĉe Esperanto-kongresoj en Nederlando en 1960 kaj 1961.

Post treege ĝuindaj 1-2 horoj ĉe subtera vinkelo

ni revenis per buso al Miskolc fervojstacio por la longa reveturo al Budapeŝto. Mi atingis mian hotelon nur je la 11-a vespere.

4 aŭgusto 1983

Hodiaŭ mi ekskursis al Eger kie mi vidis fortikaĵojn kie, antaŭ kelkaj jarcentoj, kelkcent hungaroj sukcese forpelis kelkmilojn da turkoj.

Vizito al vingustumejo estis difektita per subita averto, ke ni tuj ekiros (mi eĉ ne fintrinkis mian vinon!). Survoje hejmen ni haltis por vidi prezentadon de la famaj Lipici ĉevaloj.

5 aŭgusto 1983

Post longa envica atendado mi finfine sukcesis aĉeti kongresajn poŝtmarkojn, sed kelkaj filatelaĵoj jam elvendiĝis. Ĉiu raporto kiun mi ĝis nun legis pri la kongreso mencias la tre longajn vicojn por poŝtmarkoj, do ne estas nur mi kiu ne ŝatas atendi. Amiko mia atendis du horojn. La malfrua eldono de la poŝtmarko perdis por la hungara poŝtoficejo grandan sumon. Ili ankaŭ eldonis tro malmultajn.

Mi faris duontagan ekskurson al Tök, kie mi vidis (denove) prezentadon per ĉevaloj. Tiun vesperon mi spertis malagrablaĵon - mi ekveturis de mia hotelo je la 6-a vespere kaj iris per subtera fervojo al Keleti stacio por aĉeti veturbileton al Vieno. Mi tute ne komprenis la anoncojn en la hungara kaj rusa lingvoj, kaj nur iomete komprenis la germanan. La problemo estis ne nur trovi la ĝustan giĉeton por eksterlando, sed ankaŭ certi , ke ne estas la vico en kiu oni aĉetas sidlokbileton.



(Kelkfoje en Ĉeĥoslovakio kaj Hungario oni devas aĉeti duan bileton por certigi, ke oni ne staru la tutan vojaĝon) Feliĉe, mi renkontis ĉe la stacio la redaktoron de "Hungara Vivo" kaj li montris al mi la ĝustan vicon. Li atendis duonhoron kun mi, sed devis foriri. Post unu horo de atendado iu fermis la giĉeton, dirante, ke aliloke malfermiĝas alia giĉeto! Trovinte la alian giĉeton, mi atendis pluan horon en nova vico. Finfine mi atingis la antaŭon. Nun la servistino (kiu treege bone parolis la anglan) klarigis, ke por veturo de la landlimo de hungario al Vieno, oni devas pagi per fremdlanda "malmola" kurzo. Tion mi havis nur ĉe mia hotelo, do devis reveni tien! Reveninte ĉe la stacio kun miaj britaj pundoj, mi devis denove envice atendi tutan horon. Kiam mi finfine revenis al mia hotelo kun la veturbileto al Vieno, estis 21h45. Do, por aĉeti trajnbileton postulis 3¾ horojn!

6 aŭgusto 1983

Mi trafis la mondfaman trajnon "Orienta Ekspreso". Ĉe la landlimo kun aŭstrujo, policano demandis ĉu mi havas hungaran monon. Konstatiĝis, ke mi havas tion ĝis valoro de R60 - multe pli ol estas permesate porti el la lando. Oni forprenis la monon, donis al mi kvitancon por ĝi, kaj insistis, ke mi elspezu ĝin antaŭ ol eniri aŭstrujon. Sed kiamaniere elspezi tiom da mono sur trajno? Mi iris al la manĝvagono kie mi mendis multekostan tagmanĝon, sed kion fari kun la cetero de mia bonhavo? La kelnero sugestis, ke mi aĉetu alkoholaĵojn, rezulte de kio li alportis 5 botelojn de rusa ĉampano kaj unu botelo de vino. Akompanantino sur la tajno tuj helpis min trinki du botelojn de la ĉampano, kaj pluan botelon mi trinkis ĉe mia hotelo en Vieno. Mi enpakis la ceterajn returne al anglujo kaj sukcesis kunporti la lastan botelon hejmen al sudafriko, kie mia familio ankaŭ ĝuis ĝin. Mi aldonu, ke

la rusa ĉampano estis treege bonkvalita. Se oni nur povus aĉeti ĝin en Sudafriko.....!

C.S.B.

Decembro 1983